moto


# avanco

1/06

JANUARO – MARTO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO





# Estrara Raporto pri la agado de Kuba Esperanto-Asocio dum 2005

**Enkonduko**

Kiel tradicias, fine de la jaro la naciaj estraranoj kunmetas la jaran raporton kiu reliefigas la laboron faritan surbaze de la laborplano por la koncerna periodo.

Kun la tempopaso kaj la ĉiutaga vivopremo, la estonteco rapide fariĝas pasinteco kaj intertempe kolektiĝas amasoj da bone, nebone kaj malbone faritaj taskoj kiuj sendube estas lecionoj kaj instruoj kiuj pliriĉigas niajn spertojn. La unua kolektiva alproksimiĝo al tiuj meditoj estas nia Komitatkunsido, kie ni havas la tempospacon por ĝisdetala prikomento celante nian estontan perfektiĝon.

Dum 2005 ni okazigis la 5an Kongreson de KEA, tri naciajn renkontiĝojn, kvar seminariojn por aktivuloj kaj alispecajn aranĝojn kiuj plifortigis la socian, kulturan kaj edukan profilon de la asocio. Nia partopreno en la 90a UK kaj en la 38a ILEI-Konferenco en Litovio estis tre sukcesa. Niaj rilatoj kun la Ministerio pri Kulturo (MINCUL) kaj la Kuba Libroinstituto signife pliboniĝis.

Malgraŭ pluraj klopodoj, ni ne sukcesis solvi problemojn ekzistantajn en kelkaj filioj kaj grupoj, nek vigligis niajn rilatojn kun la Asocio de Lingvistoj kaj la Kuba Nacia Unesko-Komisiono.

Ni multe pli objektive devos pensi kaj plani taskojn por senigi tiujn malfortojn.

Ni konsciu, ke inter niaj planoj kaj deziroj, kaj la konkretaj faktoj kaj rezultoj, devos ekzisti **planita, organizita, farita** kaj **kontrolita** laboro por atingi pli altajn celojn. Ni fidas je niaj estraranoj, gvidantoj kaj aktivuloj kun ties avantaĝoj kaj malavantaĝoj kaj certas, ke ili trovos rimedojn por solvi la nuntempajn problemojn de nia movado.

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO
Prezidanto

## 1. Organizaj demandoj

Respondeca estrarano:
Alberto Fernández-Calienes Barrios

### *Membrokontrolo*

En 2005 KEA havis 433 membrojn (32 malpli ol en 2006). Resuma tabelo pri nia membraro en 2005 aperas en paĝo 4. Ĉi-jare estis aparte malfacile kunmeti tiun ĉi statistikon. Ne ĉiuj filioj raportas, dum aliaj ankoraŭ ne sukcesas kompreni la gravecon de la membrokontrolo, kiu postulas labordisciplinon. Oni aparte notu, ke Ciudad de La Habana havas pli da membroj, sed ankoraŭ ne pagis al la NE. PF Holguín informis pri pago, sed neniu kroma informo alvenis kaj ankoraŭ mankas la kotizkvitancoj.

Tiuj malglataĵoj en la laboro signifas grandan tempoperdon, ĉar oni devas dediĉi multajn horojn al ne finfaritaj aferoj anstataŭ uzi ilin por krei aliajn valorojn por la movado.

### *Atento kaj kontrolvizitoj al filioj*

La Nacia Estraro per diversaj rimedoj atentis la laborevoluon de la filioj tra la tuta lando. Pere de MINCUL kaj la provincaj Direkcioj de Kulturo ni sekvis la kontroladon de la filia laboro en la interna sfero. La sola escepto estis Provinca Filio Ciudad de La Habana, kiu ne estis kontrolita de tiuj instancoj, nek de la Nacia Estraro, kiel estis bezonate pro la apartaj cirkonstancoj travivitaj de la filio dum la jaro.

La Nacia Estraro preparis kaj gvidis Seminariojn por Aktivula Trejnado en kvar filioj: Camagüey, Ciudad de La Habana, Santiago de Cuba kaj Granma.

### *Informfluo en la Komitato*

La protokoloj de la estrarkunsidoj estis akurate senditaj al ĉiuj komitatanoj. Oni rimarkis el la informoj senditaj de kelkaj filioj, ke la protokoloj de la NE estas legataj kaj analizataj, sed malofte ni ricevas rimarkojn, kompletigojn, plendojn. La NE, siavice, ĉiam legas kaj analizas ĉion ricevitan. Ni ĉiam defendis tiun formon de informfluo, ĉar ĝi respegulas la etoson de la kunsidoj, la partoprenon de la diversaj ĉeestintoj, ktp.

### *Aliaj taskoj*

Ni dediĉis grandan parton de nia tempo al la kompilado de la nova Statuto kaj Reguloj de la Asocio kaj al la gvidado de la komisionaj kunsidoj. Aliflanke ĉiam partoprenis la finredakton de *Avanco* kaj tenas la kontakton kun la ĉefredaktoro kaj la revizia teamo en Havano kun kiu aranĝas la lastan enpaĝigon.

La nova *Adresaro 2006* estis alia el la entreprenitaj taskoj, kiu bedaŭrinde ne fluis laŭplane pro la manko de ĝisdataj informoj el multaj filioj. Fine de la jaro oni decidis finprepari la lastan version de la teksto por la bezonata faldfolio, grava informilo pri Esperanto, la monda lingvo-problemo, la E-movado kaj nia asocio, kiun KEA intencas presigi por distribuo al ĉiuj filioj.

### *Informoj al MINCUL, MINJUS*

Ĉiuj petitaj informoj estis akurate kompilitaj kaj senditaj aŭ persone liveritaj. Ekzistas tre bonaj laborkontaktoj kun s-ro Freddy

| N-ro | Provinco | Membroj | KK | KK-NE | Totalo |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Pinar del Río | | | | |
| 2 | La Habana | 2 | | | 2 |
| 3 | Ciudad de La Habana | 86 | | 11 | 97 |
| 4 | Matanzas | | | | |
| 5 | Cienfuegos | 6 | | | 6 |
| 6 | Villa Clara | | | 1 | 1 |
| 7 | Sancti-Spíritus | 4 | | | 4 |
| 8 | Ciego de Ávila | 15 | | | 15 |
| 9 | Camagüey | 73 | | | 73 |
| 10 | Las Tunas | | | | |
| 11 | Holguín | | | 1 | 1 |
| 12 | Granma | 63 | 44 | | 107 |
| 13 | Santiago de Cuba | 68 | | | 68 |
| 14 | Guantánamo | 55 | | 4 | 59 |
| 15 | Isla de la Juventud | | | | |
| | Totalo | 372 | 44 | 17 | 433 |

Rumbaut, Aganta Sekretario por Atento al Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) ĉe MINCUL, kiu estas la ŝlosilpersono en niaj kunlaboraj kaj kunordigaj rilatoj kun tiu ministerio, la Kuba Libroinstituto (ICL), kiu de nun transprenas la respondecojn antaŭe taskitajn al la Fremdlingva Eldonejo José Martí, kaj la Ministerio pri Justico kaj ties Fako pri Asocioj.

### *Sekretariejo de KEA*

La oficejo de KEA, post la dungo de nova sekretariino iom post iom evoluas al plibonigo de la administrado de nia membraro en la tuta lando.

S-ino Ana Menés transprenis la respondecon en julio 2005 kaj tre rapide kaptis la ritmon de la oficeja rutinaro. Ŝia labordaŭro estas de 13:30 ĝis 19:30 kaj estas atingebla de lundo ĝis vendredo ĉe la telefonnumero +53(7)40 4484 kaj retpoŝte sub la adreso: ana@esperanto.co.cu.

## 2. Financo

Respondeca estrarano:
Maritza Gutiérrez González

Kiel estrarano pri financoj de KEA, la jaro 2005 markis zorgigan premieron miaflanke rilate tiun ĉi taskon kiu konsistigas pilieron en la vivo de kiu ajn asocio. La transdono de funkcioj okazis laŭorde, kvankam burokrataĵoj kaj kongresaj taskoj baris la korektan kaj pli fruan ekfunkciigon de nia tuta sistemo.

Krom tiuj ĉi unuaj eventoj, la laboro koncentriĝis al plenumo de la ĉefaj taskoj skizitaj en la gvidlinioj de nia asocio rilate la flegon de la asociaj financoj kaj la internan administradon de la nacia sidejo.

### *Spezokontoj en kubaj konverteblaj pesoj (CUC)*

La evoluo de la spezokontoj dum la jaro estis ne pozitiva kaj restis tre for de la pla-

noj, kiuj iasence respondis ĉefe al sentataj bezonoj por efektivigi kelkajn projektojn kiel la tutlanda kongreso, aliaj eventoj landaj kaj eksterlandaj.

La realo montris, ke niaj limigoj rilate konceptojn por akiri valutojn forte influis negative en la realigo de la tuta buĝeto, kaj konsekvence la nivelo de elspezoj draste kaj devige reduktiĝis.

*Nacia Sidejo*

La elspezoj same evoluis laŭ la ebloj realaj, escepte la retpoŝtan servon, kiu estis ampleksigita kaj tute renovigita cele al pli ampleksa servo, kiu altigis la koston sed kompense aldonis pli racian uzon ekde teknika kaj praktika vidpunkto, eĉ se ankoraŭ pliboniĝebla kaj pliboniginda.

La eldona agado ekde financa vidpunkto estis nula pro praktikaj kialoj kiuj iris de teknikaj problemoj al burokrataĵoj.

Sen eblo oficialigi kontrakton pri tio, la buĝetero por eldonoj estis praktike ne tuŝebla kaj la perspektivoj por la nuna jaro restas samaj.

*Estraro*

Rilate la estraran elspezon, la komitatkunsido superis la planitan ciferon kiel konsekvenco de la nuntempa enlanda monevoluo kiu permesas akiri kelkajn servojn nur en konverteblaj pesoj.

(**Noto:** Validas por ambaŭ monunuoj, ke la buĝeto dediĉita al Expolingua estis transmetita al la buĝetero "Estrara Rezervo" pro tio ke la evento estis nuligita).

*Spezokontoj en kubaj pesoj (CUP)*

La evoluo de la spezokontoj en kubaj pesoj estis relative pozitiva kompare al la reala situacio kiu limigas nian akireblecon de mono.

La enspezoj pro kotizoj restis nur je 75 % je landa nivelo, kio devas esti instigilo por ke ĉiuj filioj, kun la sola escepto de Granma, reviziiu kaj ŝanĝu la procedojn rilate enspezon kaj liveradon de kotizoj al la Nacia Estraro.

La kongreso de KEA nur alportis iom da pesoj, sed ĝi ne tute kovris la servojn donitajn al kongresanoj, kio rekonfirmas la bezonon subvencii la landajn kongresojn se ne sanĝiĝas la realaj eblecoj pri pagipoveco de la kubaj esperantistoj kaj la tuta enlanda monsistemo, kies perspektivoj ne montriĝas ankoraŭ ŝanĝeblaj. Pri tio la estraro ĉiam devos zorge pritaksi kaj klopodi diversajn manierojn eltrovi favorajn solvojn por ĉiuj.

*Nacia Sidejo*

Surbaze de interkonsento de la Komitatkunsido 2004, la nacia sidejo ekfunkciigis propran oficejon kun nova sekretariino kiu surprenis plurajn taskojn antaŭe dise plenumitaj de laboristoj kaj estraranoj. Tiu ĉi nova situacio pozitive evoluis, sed ekde financa vidpunkto altigis la kostojn de administrado, krom la laŭleĝe deviga salajra altigo. La laboristaro de KEA nuntempe estas super la meza salajro starigita de la leĝo kaj la impostaj pagoj estis konsekvence pli altaj.











Telefonkostoj ne spegulas la realon pagitan, tial ke pro organizaj kaj burokrataj kialoj kelkaj fakturoj restis postlasitaj kaj ili estos ŝarĝitaj kontraŭ la buĝeto 2006.

*Nacia Estraro*

La Nacia Komitatkunsido ne atingis la sumon planitan, kio estis kovrita de la buĝeto en konverteblaj pesoj. La ceteraj eroj planitaj por vizitoj kaj eventoj restis sub la atendita nivelo, kiu ankaŭ estis efiko de la streĉa evoluo de la enspezoj. Tiu ĉi fakto iom haltigis nin je la momento decidi planitan viziton aŭ partopreni eventojn.

*Resumo*

La evoluo de la spezokontoj en ambaŭ monunuoj estis deficita pro kialoj diversaj, nome, la konata limigo pri monenspezo laŭ tre difinitaj kaj magraj konceptoj.

Aliflanke, ni konsideras ke la potencialoj de la asocio estas ankoraŭ relative favoraj je tutlanda nivelo, sed grandparte dependos de nia kapablo adaptiĝi al la reala situacio de la landa ekonomio kaj meminiciati projektojn je lokaj grupoj, kiuj per minimuma buĝeto aŭ subvenciado kaj individua kaj/aŭ grupa, permesu al ni realigi niajn planojn.

Rilate la sidejan administradon, temas pri tre streĉiga agado, sed per pli bona organizo interna rilate la propre administrajn kaj burokratajn taskojn unuflanke, kaj rilate la estraran planadon aliflanke, kun la akurata kaj pli aktiva laboro de la diversaj filioj tra la tuta lando, ni povas sukcesi pli ekvilibre teni la nivelon de enspezoj kaj elspezoj kun la celo eviti aŭ redukti la eblajn deficitojn, kio ankaŭ dependas de eksteraj faktoroj en la landa ekonomio mem.

Ni klopodu labori per kapo iniciatema, sed per piedoj sur la tero en la senco, ke kiam ni planu niajn estontajn agojn, eventojn lokajn, grupajn, regionajn, tutlandajn... ni ankaŭ mezuru kiel eble plej bone la realajn eblecojn ilin plenumi ankaŭ finance.

## 3. Informado

Respondeca estrarano:
Juan Ramón Rodríguez Gómez

Komence de la jaro, nia informa laboro estis markita de la 5a Kongreso de KEA, kio postulis de ni entrepreni diversajn demarŝojn rilate propagandon per diversaj amasmedioj: radio, ĵurnaloj kaj televido, kun la konstanta valora helpo de Alejandro García, aktivulo de tiu ĉi fako. Tio ĉi alportis kontentigajn rezultojn. Ni pli malpli same agadis okaze de la datreveno de KEA kaj fine de la jaro, tamen granda parto de la plano ne plenumiĝis pro diversaj kialoj.

Grava parto de nia agado rilate "konsciigi la membraron pri la bezono entrepreni personan informadon pri KEA kaj nia lingvo en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de Esperanto" estis farita en diversaj aranĝoj pere de temaj analizoj, prelegoj kaj aliaj. Pri tio, ni devas pli kaj pli emfazi, tiel ke niaj homoj ricevu jen en la aranĝoj, jen en la klasoĉambroj, regulan informadon pri

tiklaj temoj rilate al la lingvo kaj al la evoluo de nialanda kaj internacia E-komunumo.

Rilate la aperigon de nacinivelaj informiloj, oni sukcesigis la aperigon de tri numeroj de *Avanco*, ĉefe danke al la laboro de Norberto Díaz, kiu entreprenis tiun taskon ekde la pasinta Komitatkunsido. Tamen, ankoraŭ estas problemoj kunordigaj kaj manko da kunlaboraĵoj, ĉefe el ekster la Nacia Estraro, kio devigas la redaktoron mem redakti plurajn el la artikoloj kaj prokrastigi la aperon de la numeroj. Ni garantiis ĝian sendadon al eksterlandaj asocioj, amaskomunikiloj kaj institucioj, al niaj komitatanoj kaj aktivuloj kaj al la membroj-subtenantoj.

Pli malbona situacio prezentigis pri *Universo* ĉar mi nur sukcesis aperigi tri numerojn, el la dek planitaj. Tradicie, ni havas kiel laboraspekton iel stimuli la esperantistojn kontribui al apero de KEA en la internacia E-gazetaro, sed dum 2005, tiu ĉi tasko ne estis sufiĉe vigla. Tamen, kelkaj informoj pri nia agado aperis en la revuo *Esperanto*, kaj la informa agado per retmesaĝoj estis aparte vigla dum la jaro flanke de la Estraro kaj aliaj aktivuloj en la lando.

### Rilatoj kun enlandaj institucioj

Dum la jaro la Asocio daŭre flegis siajn rilatojn kun diversaj institucioj. La rilatoj kun MINCUL regule okazis kun la Fako Asocioj, specife pri kulturaj programoj por pritrakti la planon de eventoj kaj aliajn gravajn aspektojn koncerne la vivon de la Asocio. Ni plurfoje kontaktis kun Asocio de Lingvistoj, pere de ĝia prezidantino, kiu ankaŭ interesiĝas pri prelego(j) de eksterlandaj fakuloj pri Esperanto, temo pri kiu montris interesiĝon la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko. Ni ankaŭ kontaktis plurfoje UN-Asocion, sed ĉefe kiel kolektiva membro de tiu institucio. Rezulte el tio, en septembro, KEA ricevis inviton de la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj, partopreni Forumon de NRO-j kontraŭ la Usona blokado, sesiinta fine de oktobro en Havano. Ni ankaŭ havis kontaktojn kun Fondaĵo Fernando Ortiz (ĉi-kaze kun bonegaj rezultoj). Aliaj demarŝoj ĉe la Kuba UNESKO-Komisiono kaj la Regiona Komisiono de UNESKO ne estis fruktodonaj.

### Amerika agado

Dum 2005, nia laboro sur tiu ĉi kampo ne estis tiel vigla kiel dezirate, tamen oni kelkfoje kontaktis kun Landaj Asocioj kaj la Amerika Komisiono, kaj garantiis la sendadon de la asocia organo, kiel jam de longe ni faras. Krome, oni repretigis la projekton pri Karibio, ĉi-kaze prezentita sub la nomo "Esperanto por daŭropova evoluo en la regiono" (ankaŭ por Centra Ameriko), partoprenis la Kariban Festivalon en Santiago de Cuba, kaj aranĝis aliajn aferojn kun homoj el tiu regiono studantaj en Kubo, sed la rezultoj ankoraŭ ne estis fruktodonaj. Kompreneble, ni devas labori pli intense sur tiu ĉi kampo dum 2006, eĉ kun (aŭ pere) de la Kuba UNESKO-Komisiono.

### Historio

La Komisiono pri Historio en Ciudad de La Habana agadis dum la periodo je diversaj






branĉoj kun la dokumentaro ekzistanta ĉe ni, sed ne tiel intense kiel en antaŭaj jaroj. La laboro de la komisionanoj permesis klasifi kaj kontroli kelkajn novajn kaj malnovajn dokumentojn aperintaj en la jaro, kaj kolekti centojn da artikoloj, informoj kaj notoj el la eksterlanda E-gazetaro en la 20a jarcento, kion iom post iom oni enkomputiligas. Dum la 5a Kongreso de KEA, ni ankaŭ aranĝis ekspozicion pri nia movada historio.

## 4. Eksteraj rilatoj

**Respondeca estrarano: Julián Hernández Angulo**

Dum la periodo, la Nacia Estraro kaj la membraro tenis viglajn la kontaktojn kun UEA kaj la landaj asocioj donante prioritaton al tiuj de Ameriko.

Danke al la nova teknologio esperantistoj tra la lando starigis kaj solidigis la rilatojn kun E-grupoj en la tuta mondo. La fakto, ke Maritza Gutiérrez atentas Landan kaj Regionan Agadon ene de la Estraro de UEA ampleksigis niajn eksterajn rilatojn.

Dum la 90a UK en Vilno, kaj la 38a ILEI-Konferenco en Kaŭno (Litovio), oni ankaŭ plifirmigis niajn eksterajn rilatojn per la multaj kontaktoj flegataj kun personoj kaj instituticoj de la internacia E-movado.




## 5. Instruado

Respondeca estrarano: Marta Alonso Gutiérrez

***Kursoj, metodologio, lernomaterialoj***

Rilate al la kursoj dum tiu ĉi jaro estis la bazaj kursoj de la unua kaj dua nivelo, la perkoresponda kurso, la distanca kurso, reta kurso, komputila kurso, kaj daŭriga kurso por la estraranoj, aktivuloj, kaj interesitoj en Ciudad de La Habana. Ĝi okazis la lastan dimanĉon ĉiumonate gvidata de Pedro Fernández.

**Filioj kie okazas E-kursoj:** Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma (en ĉiu municipo), Holguín, Camagüey (Camagüey, Cascorro, Florida), Ciego de Ávila, Cienfuegos, Sancti-Spíritus, Matanzas (Pedro Betancourt), kaj Ciudad de La Habana (Plaza, Diez de Octubre kaj Centro Habana). Krome okazas kurso en la Universitato de Informadikaj Sciencoj (UCI).

**Filioj kiuj havas korespondan kurson:** Guantánamo, Granma, La Habana, Ciudad de La Habana, Villa Clara.

El tiuj provincoj, Granma estas la plej nombra kaj la plej agema tiusence. Mi volas aparte reliefigi la laboron de Provinca Filio Granma. Tie la koresponda kurso havas lernantojn en ĉiu municipo.

Mi volas rimarki la laboron de Ljudmila Kaŝtanova kiu atentas tutlande la Korespondan Kurson kunordige kun la estrarano pri instruado, kasistino kaj la sekretariino de KEA. La laboro de Ljudmila estas konstanta kaj tre bona. Ŝi ankaŭ partoprenas la provincan ILEI-kunsidon.

**Filioj kiuj partoprenas la Distancan Kurson:** Guantánamo 1, Santiago de Cuba 3, Granma 6, Cienfuegos 1, kaj Ciudad de La Habana 10. La Distanca Kurso estas gvidata de Marta Alonso kaj Pedro Fernández. Oni esperas, ke dum 2006 interesitoj el aliaj filioj ankaŭ partoprenos la distancan kurson,

kiu ebligas al iamaj kursanoj daŭrigi la lernadon de la lingvo pere de sendataj materialoj per kiuj ili povas mem taksi la evoluon de lingvolernado.

Oni garantiis la lernomaterialon por la kurso laŭ la mendoj, sed la kvalito de la materialoj por la baza kurso kaj la koresponda kurso estas tre malbona. Por solvi tion, la Nacia Estraro en sia marta kunsido interkonsentis, pri la preparo de nova lernolibro por la baza kurso kaj ankaŭ ekzercaro por la unua nivelo. Tuj post ilia apero ni distribuos ilin al la filioj.

La Retkurso havis du lernantojn el kiuj unu jam finis (li estas el Aŭstralio), la alia lernantino estas kubanino kiu baldaŭ finos la lernadon.

Tiun ĉi kurson ni konsideras tre bona kaj petas al esperantistoj kun retaliro propagandigi tiun ĉi kurson.

En Granma la komputila kurso okazas en la lokaj Joven Club. Mi sendis diskedojn al la filio por ĉiu klubo en la provinco, kie junuloj, infanoj kaj plenkreskuloj havas la ŝancon rilatiĝi al Esperanto pere de la komputilo.

Se niaj filioj kunordigus tiun agadon kun la lokaj Joven Club ni tiel havos Esperanto-kursojn en ĉiu provinco, ĉar en ĉiu municipo en la lando ekzistas tiaj komputilaj kluboj.

Ankaŭ en la laborejo de Manuel Rodríguez Rábago estas instalita la kurso en ĉiu komputilo por interesigi la lernantojn.

Se ĉiu esperantisto kiu havas eblecon fari tion en la laborejo petus la kurson kaj instalus ĝin en la komputiloj, estus pli kaj pli da homoj kiuj interesiĝos kaj lernos Esperanton.

Kelkfoje la homoj ne havas tempon iri al la lernejo sed, normale ĉiutage dum horoj sidas ĉe komputilo; krom tio, eĉ se ne lernos, ili konos pri Esperanto kaj tio estas jam avantaĝo.

### *Varbado por la kursoj*

Por varbi interesitojn en la diversaj kursoj mi sendis leterojn al la filioj kun klarigoj pri la diversaj kursoj. Mi kontaktis la filiojn telefone kaj rete laŭ la eblo. Ili faras la plejeblon, por ke la diversaj kursoj antaŭeniru. En la protokoloj senditaj de la filioj, ili respegulas la laboron faratan en la instrua fako.

Ĉiu estrarano de la filioj kaj ĉiu esperantisto devas esti puŝmotoro por varbi novajn membrojn, pro tio en la diversaj aranĝoj oni devas informi la diversajn eblecojn por lerni Esperanton kaj tiu varbado ne estas afero kiu rilatiĝas nur al la fako instruado.

Dum 2005 la filioj havis pli da kursoj por elekti kaj iom post iom la afero pliboniĝos.

Nepre la materialoj de la Koresponda Kurso devas esti pli bonaj kaj altkvalitaj. Nuntempe la malbona kvalito de la materialoj baras malhelpas la celon havi pli da lernantoj en la KK. Duono aŭ pli el la komencintoj plendas pro la kvalito de la materialoj kaj ne daŭrigas ĉar komprenas nenion.

Certe en filio Granma estas alia situacio ĉar ili apogas la kurson per periodaj renkontiĝoj. Mi petas al Rafael Cabrera raporti pri la laboro de la KK en sia filio, kiel ĝi funkcias en provinco Granma ĉar tiu sperto povas plibonigi la kurson en aliaj filioj, poste tiun informon ni povas presi kaj dissendi.

### *Instrua rolo de* Avanco

Por plenumi tiun taskon mi regule interkonsentis kun Norberto Díaz Guevara

ĉefredaktoro de *Avanco* por ke estu publikigitaj artikoloj pri diversaj temoj ĉiuj rilataj al ILEI-Sekcio aŭ al instruado. Mi volas laŭdi lin ĉar li ĉiam respondas la retmesaĝojn kaj tre bone faras sian laboron.

### *Metodologia kaj lingva atento al la instruantaro*

Ĉiumonate oni sendis al al filioj materialon pri metodologio aŭ pri aferoj rilataj al la ILEI-Sekcio. En la protokoloj senditaj mi vidis, ke la filioj analizas la instruadon, tiel mi taksas bona la laboron de la filioj tiufake.

Dum la tago de la instruistoj oni sendis dankleteron kaj libroliston por ke la instruantoj elektu unu por si. Ankaŭ estis senditaj dankleteroj al la aktivuloj de la instrua fako.

Mi volas laŭdi la laboron de la instruantaro tra la lando, rekoni ilian laboron kaj ankaŭ mencii tiujn kiuj helpis dum la enskribiĝo en la diversaj municipoj en Ciudad de La Habana: Ana Menés, sekretariino de KEA kiu prizorgis la enskribiĝon en Diez de Octubre, Ljudmila Kaŝtanova, Centro Habana; Miriam Casals, Plaza; Alejandro García Rodríguez kiu prizorgis la novaĵelsendon pri la novaj E-kursoj en tutlandaj kaj provincaj radiostacioj.

La ILEI-Sekcio de Urbo Havano, gvidata de Pedro Fernández, kiu respondecas province pri la ILEI-Sekcio, funkciis la unuan lundon ĉiumonate. En tiuj kunsidoj ni analizis ekspresan kurson kiu nun esta reviziata por posta eldono. Mi esperas, ke dum la monato majo 2006 estos en la filioj tiu nova kurso por esti analizita de la ILEI-Sekcioj tra la lando. Mi instruos en Urbo Havano tiun novan kurson kaj poste informos al la filioj pri la rezulto.

Marte, dum la kongreso de KEA, okazis la Unua Nacia Konkurso pri la Leciono, kiun partoprenis niaj E-instruistoj.

La partoprenintoj estis Gonzalo Collantes, el Santiago de Cuba; Isnel Pupo, el Holguín; Yoelvis Liaño, el Cienfuegos; Malú Pacheco, el Sancti- Spíritus; Pedro Fernández kaj Manuel Rodríguez Rábago, el Ciudad de La Habana. Ili prezentis lecionon pri diversaj temoj kaj mem taksis la rezulton de aliaj lecionoj. Ankaŭ partoprenis kiel observantoj multaj interesitaj esperantistoj el diversaj filioj.

La unua loko estis por Pedro Fernández, la dua loko estis por Gonzalo Collantes kaj la tria loko estis por Manuel Rodríguez Rábago.

Mi pensas, ke tiujn seminarioj aŭ konkursojn pri instruado oni devas fari en ĉiu evento okazanta en la lando.

### *Rilatoj kun ILEI kaj partopreno en ties projektoj*

Ni havas retpoŝtajn kontaktojn kun ILEI kaj aktive partoprenas ties edukajn projektojn. La asocio organizas seminariojn en la filioj en kiuj oni traktas diversajn temojn. Mi partoprenis la Seminarion pri Aktivula Trejnado en Ciudad de La Habana kaj prezentis temon kune kun la provinca ILEI-sekciano de Urbo Havano Pedro Fernández.

Dum la KEA-Kongreso la ILEI-Sekcio de KEA kunsidis kaj el tiu kunsido rezultis la

revivigo de nia ILEI-Sekcio en la tuta lando kiu iom post iom plifortiĝos. En letero sendita al la ILEI-sekcianoj ili konsentis partopreni ĉiujn edukajn projektojn de ILEI, multfoje estas petata helpo de diversaj landoj por instrui la lingvon. Mi pensas, ke niaj E-instruistoj kiuj multe laboras por Esperanto en la tuta lando povas partopreni tiujn projektojn.

Julián Hernández Angulo kaj Maritza Gutiérrez González aktive partoprenis la 38-an ILEI-Konferencon en Litovio per prelegoj kaj dum aliaj programeroj.

## 6. Kulturo kaj disvastigo

Respondeca estrarano:
Albania Duthil Álvarez

### *Kulturo*

La partopreno de la amatoraj kaj profesiaj artistoj de la asocio en eventoj kiaj la 5a Kongreso de KEA, kaj la renkontiĝoj en Guáimaro, Contramaestre kaj Guantánamo respegulis la laboron faritan en tiu laborsfero. Niaj membroj ankaŭ kontribuis al la kultura programo de niaj oftaj aranĝoj kiam ni kaptis la okazon por celebri altsignifajn datojn por nia kulturo: Valentena tago (14a de februaro), tago de la virino, patrintago, patrotago, ktp.

Niaj esperantistoj partoprenis en eksterasociaj eventoj kiaj la kulturaj rondoj de Fabiana, en Alamar; de Miriam Casals kaj Elda Carrillo en Plaza, de Marta Anglada, en Diez de Octubre kaj la rondo de manlaboristinoj en Bayamo. Oni ankaŭ devas mencii la agadon de Isnel Pupo kaj sia edzino Yosleidy Leyva en pluraj komunumoj de Holguín kun la pupteatro "Bona Amiko" kaj ankaŭ la seriozan laboron de la folklora ensemblo de Bayamo.

José de Jesús Campos Pacheco, esperantisto el Pedro Betancourt (Matanzas) daŭre tradukas konatajn bildstriojn kaj sendas ilin al la redaktoro de *Juna amiko*, kiu aperigis ilin.

Menciindas la prezento de niaj artistoj en aranĝo okazinta en hospitalo Ramón González Coro dum la Valentena Tago kun partopreno de pli ol ducent personoj, kaj ankaŭ nia ĉeesto en "Festival de la Palabra" okazinta en la Iberamerika Kulturcentro en Havano.

La Komisiono pri Historio daŭrigis siajn esplorlaborojn kaj el la klasifita materialo organizis ekspozicion kadre de la 5a Kongreso.

La biblioteko de la sidejo iomete reviglliĝis danke al la konstanta agado de la estrarano pri kulturo kaj helpantoj. Oni devas diskonigi informojn pri nia biblioteko kaj la E-fakoj en kelkaj provincaj kaj municipaj bibliotekoj. Oni ankaŭ sendis pli ol sepdek leterojn al pluraj bibliotekoj en la tuta lando por veki la intereson pri E kaj varbi novajn lernantojn.

### *Disvastigo*

Dum 2005 la Nacia Estraro multe klopodis aktivigi la movadon en tiuj provincoj kie la agado ne estis forta sed la rezulto ankoraŭ ne estas kontentiga.












Post la sendado de leteroj kaj poŝtkartoj al bibliotekoj de kelkaj municipoj kaj provincoj venis kelkaj respondoj de interesitoj en La Habana (Madruga, Bauta, Santa Cruz del Norte kaj San Antonio de los Baños), Matanzas (Pedro Betancourt), Villa Clara, Las Tunas kaj Manatí.

Danke al la laboro de Norberto Díaz Guevara kaj Bárbara Borrell, la agado en Cienfuegos vigligis.

La estraro kreis grupon de aktivuloj, sub la gvido de la estrarano pri disvastigo, kiuj atentas la provincojn kie ne ekzistas esperantista agado.

La agado en Granma kaj Guantánamo kreskis, en Camagüey, Santiago de Cuba kaj Urbo Havano iom reduktiĝis.

En Holguín la membraro kreskis iomete kaj ilia unua prioritato restas la infanoj. Ili plifortigis sian kulturan laboron kun infanoj en la komunumo.

La agado en Sancti Spíritus kaj Ciego de Ávila restis en la sama stato, malgraŭ la klopodoj faritaj de la tieaj estraroj.

La E-klubo en la Universitato de Informadikaj Sciencoj (UCI) gvidata de Ronald Baby plialtigis sian membraron (nuntempe estas pli ol 120 membroj) kaj solidigas sian laboron. Ili aktive partoprenas la vivon de tiu universitato.

La estrarano pri disvastigo daŭre stimulis kaj kontrolis la laboron pere de la diversaj rimedoj je sia dispono kaj multe komunikiĝis kun la esperantistaro en la tuta lando celante la plej bonan laboron de ĉiuj filioj kaj grupoj.

## 7. Utiligo


Respondeca estrarano:
Alberto García Fumero

Alberto García Fumero rezignis pri sia respondeco en la Nacia Estraro komence de la jaro pro familiaj problemoj.

Dum la jaro daŭre funkciis, gvidata de Manuel Rodríguez Rábago, la Fakgrupo pri Turismo, kiu fariĝis dekjara, kaj la ILEI-Sekcio, kies laborrezultoj estas raportitaj sub Instruado.

La utiligo de la lingvo daŭre estas nesufiĉe komprenata de nia aktivularo; tamen oni daŭre progresas en la senco ke ni provas pruvi ĝian potencialon tra diversaj institucioj kulturaj kaj informaj: Novaĵagentejo AIN, gazeto *Ahora* (Holguín), radiostacioj kaj aliaj. Oni prezentis la asocion, eĉ se modeste,



dum la Kariba Festivalo kaj kontaktoj ekzistas kun institucioj kiel Fondaĵo Fernando Ortiz kaj UN-Asocio, i.a.

Oni daŭre stimulis la membraron al korespondado kaj grupiĝo laŭ fakoj aŭ komunaj interesoj; ĉi-lasta estas strategio kiu kongruas kun la evoluo de la nunaj tempoj kaj kondiĉoj konkretaj de la diversaj teritorioj. Ankaŭ laborterreno de la estrarano, samtempe ĉefdelegito de UEA, estas la konstanta varbado de pliaj fakdelegitoj; ilia nombro iom post iom kreskas, kvankam inter niaj movadanoj vere ne estas plena kompreno de ilia rolo kaj potencialo.

## 8. Eldona agado

Dum la lasta komitatkunsido Norberto Díaz Guevara estis nomumita nova ĉefredaktoro de *Avanco*. La gazeto aperis trifoje plus numero mankanta el la antaŭa jarkolekto. Ankaŭ estis eldonitaj tri numeroj de *Universo* redaktitaj de Juan Ramón Rodriguez Gómez.

Ekzistas de antaŭ kelkaj jaroj planoj por eldoni vortaron kaj novan lernolibron por memlernantoj. Ambaŭ projektoj estas tre temporabaj kaj la engaĝitaj kompilantoj kaj aŭtoroj estas samtempe movadaj aktivuloj kun respondecoj en la Nacia Estraro, kio ege malfaciligas la taskon. Ambaŭkaze temas pri prioritatoj de la asocio: lernomaterialoj por komencantoj kaj kursfinintoj kiuj motivigas la seriozan okupiĝon pri Esperanto.

Fino de la Estrara Raporto 2005



# Ĉefaj taskoj 2006

**1. Informado kaj eldona agado**

1.1. Informi al la publiko pri E, la internacia E-movado kaj KEA per ĉiuj eblaj rimedoj kaj aparte per Radio Progreso, Radio Havano-Kubo, Radio Rebelde, Radio Reloj kaj per la servoj de la nova teknologio. Daŭre flegi la aktualigon de la KEA-retejo.

1.2. Profiti la servojn de Radio Havano-Kubo por informi al Amerikaj kaj Karibiaj landoj pri Esperanto.

1.3. Varbi por minimume altigi la membraron je 25 % laŭ la UEA-kampanjo "Por pli vasta komunumo".

1.4. Eldoni kaj sendi la organon *Avanco,* kvarfoje jare.

1.5. Eldoni la novan ekzercaron de la unua nivelo.

**2. Disvastigo**

2.1. Labori por aktivigi la movadon en Villa Clara, Pinar del Río kaj La Habana.

2.2. Labori por kreskigi la movadon en Sancti- Spíritus, Holguín, Ciego de Ávila kaj Cienfuegos.

2.3. Labori por firmigi la movadon en Camagüey, Ciudad de La Habana, Santiago de Cuba kaj Guantánamo.

**3. Organizaj demandoj kaj interna administrado**

3.1. Atenti kaj kontrolviziti provincajn filiojn kaj municipajn grupojn.

3.2. Instigi kaj kontroli, ke filioj sendu la kotizpagojn, kotizkvitancojn kaj membrokontrolojn rezulte de la jarkotizo, laŭ la postuloj de la Leĝo 54 kaj ĝia Regularo.

3.3. Flegi la informfluon al la Komitato per la protokoloj de ordinaraj kunsidoj de la NE kaj aliaj gravaj informoj.

3.4. Sendi la organon de KEA al la membroj-subtenantoj.

3.5. Flegi la organizan kaj internan administradon de la Nacia Sidejo de KEA.

**4. Financoj**

4.1. Kontroli la plenumon de la buĝeto de KEA en CUP kaj CUC.

4.2. Atenti kaj kontroli la filiojn kun emfazo en la konscio pri memfinancado kaj travideblo en ĉiuj niveloj. Flegi la plenumon de la enspezoj pro koncepto de Libroservo en la jara buĝeto.

4.3. Kontroli la financojn de la provincaj filioj kaj municipaj grupoj. Kontroli la Libroservon kaj labori por kreskigi ĝian stokon.

**5. Instruado**

5.1. Flegi la okazigon de diverstipaj kursoj, kiel ekspresaj kaj regulaj, tutlande kaj kontroli ties kvaliton metodologie kaj lingve. Garantii la bazajn lernomaterialojn.

5.2. Aktive partopreni la UEA-kampanjon "Por pli vasta komunumo" por varbi interesitojn kaj kreskigi la kvanton de lernantoj en la diversaj kursoj, speciale en la Koresponda Kurso.

5.3. Flegi la instruan rolon de la organo de KEA.

5.4. Kontroli kaj atenti la instruistaron (ILEI-Sekcio) metodologie kaj lingve.

5.5. Flegi la rilatojn kun ILEI kaj laŭeble partopreni ties edukajn projektojn.

5.6. Prepari kondiĉojn por okazigi ekzamenojn KEA/ILEI de baza kaj meza niveloj.

**6. Eksteraj rilatoj**
**Enlande:**

6.1. Daŭre flegi la rilatojn kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiuj niveloj.

6.2. Plifortigi la rilatojn kun la rilatorgano. Flegi la korektan plenumon de la rilatkontrakto.

**Eksterlande:**

6.3. Daŭre flegi la kontaktojn kun UEA, landaj asocioj (aparte kun la Amerikaj), Internacia E-Instituto kaj kluboj.

6.4. Plifortigi la solidarajn rilatojn kun landaj asocioj, kluboj kaj amikaj organizaĵoj. Aparte flegi la rilatojn kun FEL kaj "La Amikoj de Kubo".

**7. Kulturo**

7.1. Kontroli kaj atenti la kulturajn programojn de la asociaj aranĝoj kaj eventoj. Flegi la reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj.

7.2. Okazigi naciajn aŭ regionajn kulturklerigajn aranĝojn en Guantánamo, Granma, Santiago de Cuba, Holguín, Camagüey, Ciudad de La Habana, Ciego de Ávila, Cienfuegos.

7.3. Vigligi la servojn de la biblioteko de la sidejo. Atenti la korektan utiligon de la E-fakoj en la bibliotekoj de Guantánamo kaj Santiago.

7.4. Aktive partopreni la UEA-kampanjon "Savi esperantaĵojn" kun la celo prizorgi kaj savi historie valorajn esperantaĵojn en niaj bibliotekoj.

7.6. Stimuli la partoprenon de nia membraro en eksterasociaj eventoj kulturaj kaj klerigaj.

**8. Utiligo de Esperanto**

8.1. Okazigi SAEST 2006.

8.2. Stimuli la esperantistojn al utiligo de E en scienco kaj tekniko. Atenti la okazigon de fakaj renkontiĝoj. Krei fakgrupojn.

8.3. Prepari esperantistojn de informa kaj lingva vidpunktoj por atenti alilandajn vizitantojn.

8.4. Iniciati klerigajn projektojn en sciencaj kaj fakaj medioj. Flegi la rilatojn kaj agadon de KEA en universitataj medioj.

## Nova ĉefredaktoro de *Avanco*



Norberto Díaz Guevara, elektroinĝeniero; administranto de komputila reto; esperantistiĝis en 1986 kaj iom poste fariĝis E-instruisto en urbo Sancti Spíritus. En la sekvintaj jaroj membris en la provinca estraro de la filio kiel ĝenerala sekretario kaj poste kiel prezidanto dum kelkaj jaroj; novembre de 1993 li fondis kaj ekredaktis la bultenon Jajabo, organo de la Provinca Filio en Sancti Spíritus. Li aktivis en Kuba E-Asocio kiel komitatano kaj nuntempe estas Estrarano de KEA pri Informado; li estas ankaŭ individua membro kaj fakdelegito de UEA.


avanco

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

(n-ro 1/2006, januaro–marto)
Aperas 4-foje jare
**Eldonas:** Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, 10500 Havano, Kubo
Telefono: +53(7)40 4484; Fakso: 643 8729
avanco@esperanto.co.cu
**Ĉefredaktoro:** Norberto Díaz Guevara
norberto@ssp.desoft.cu
**Revizias:** Julián Hernández Angulo, Alberto F. Calienes, Maritza Gutiérrez González, Juan R. Rodríguez Gómez
**Enpaĝigo:** Norberto Díaz Guevara
Alberto Fdez-Calienes Barrios
Reproduktado permesata
Interŝanĝo dezirata


**La kovrilo:** *Partoprenintoj en la 23a Komitatkunsido de KEA okazinta en la Sidejo de Kuba Esperanto-Asocio en Havano, de la 26a ĝis la 29a de januaro.* Foto: Calienes.

# Lernu nun!

**Aprenda agora!** Learn now!
Leer nu! Ap... ...ez maintenant!
¡Aprenda a... Учете сега!
Jetzt ler... Laere nu!
Учите сей... ...a adesso!
Opi nyt! ...ię uczyć!
Mokykis dab... ...ācies tagad!
!לימדו עכשיו 今学びなさい!
تعلم الآن 现在就学吧!
지금 배우십시요!




avanco

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

**Kuba Esperanto-Asocio**
Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484; Fakso: 649 8729
avanco@esperanto.co.cu

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro